Cobalah lihat di jejaring sosial, banyak pertanyaan yang ditanyakan tentang bahasa asing apa yang paling mudah dipelajari. Jawaban pun tidak meyakinkan sehingga kita yang awalnya berniat untuk mempelajari bahasa tersebut, akhirnya kita

memutuskan untuk tidak melanjutkannya karena kita bingung dengan jawaban yang tidak jelas. Pada prinsipnya, gampang atau susah bahasa asing itu tergantung dari niat dan tujuan untuk mempelajari bahasa tersebut.

Dengan kendala – kendala di atas, beberapa solusi barangkali yang ditawarkan penulis mendorong para pemula untuk mempelajari bahasa asing:

#### **Komitmen**

Komitmen itu sangat penting karena untuk mengetahui tingkat keseriusan dalam mempelajari bahasa asing. Buatlah jadwal rutin dan tentukan situs online yang memungkinkan kita untuk terus belajar. Contohnya, bergabunglah di salah satu fanpage bahasa sehingga kita bisa mempraktikkan dengan yang lainnya sesuai dengan jadwal yang sudah ditentukan. Perlahan namun pasti anda bisa mengerti.

#### **Buat Catatan**

Catatlah kata – kata asing dan temukan artinya, kemudian cobalah untuk membuat kalimat sederhana dengan menggunakan kata – kata tersebut.

#### **Aktif**

Carilah teman - teman yang sedang belajar bahasa yang sama dengan anda dan secara aktif mengirim pesan di jejaring sosial. Jangan ragu untuk berkomunikasi dengan orang asing di internet atau pusat kota.

#### **Menonton, Mendengar dan Mempelajari**

Menonton adalah cara terbaik untuk mempraktikkan secara langsung karena kita bisa mendengar secara langsung cara pengucapan yang benar kata, serta penulisan yang benar. Kemudian pelajari lagi untuk mendapat pemahaman yang baik.

Dengan tulisan singkat ini, penulis ingin mengatakan bahwa menguasai bahasa asing adalah sebuah keuntungan karena akan memudahkan berkomunikasi dan memperbanyak teman – teman dari seluruh dunia. Bahasa asing adalah pintu untuk mengetahui berbagai macam informasi dan kunci untuk mengenal peradaban dunia lain yang belum pernah kita jumpai. Ingat bahwa mempraktikkan bahasa asing itu didasarkan pada niat dan ketertarikan. Yakinlah bahwa dua hal ini akan membantu anda untuk menguasai dengan mudah dan pastinya kita bisa mempraktekannya... Selamat Belajar.... Salam.

**Verkisto de Engelbert**



*Berkaitan dengan hari Esperanto tahun 2015 pada tanggal 26 Juli dan Kongres Esperanto Internasional ke-100 di Lille, Perancis, Asosiasi Esperanto Indonesia (IEA) menghimbau kepada teman-teman esperantis Indonesia untuk berpartisipasi memperkenalkan bahasa Esperanto di lingkungan dan komunitasnya dengan melakukan kampanye Esperanto.*

*Untuk mendukung kegiatan tersebut, IEA menjual PIN seharga Rp. 2500/pc.*

*Bagi yang ingin memesannya, silakan menghubungi Ilia, melalui e-mail: estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.*

# Mia Recepto!



## Ingrediencoj

2 Densaj Panoj  
2 Ovoj  
Rallado Fromaĝo  
Salo  
Pipro

## Direktoj

1. Premu la internon de la panojn farante formo kvadrato kun kulero.
2. Disvastigu la panojn kun salo kaj pipro.
3. Rompu la ovojn super la kvadrato en la pano sek-cio. Zorgu ne tuŝi la ovojn yemajn.
4. Disvastigu la ovojn yemajn.
5. Diskonigu buteron sur la randoj de la panoj, dis-vastigu ralladojn fromaĝojn sur supro de la butero.
6. Metu panojn en forno kaj baku dum 15 minutoj ĉe temperaturo de 275 gradoj.
7. Pano ovo fromaĝo bako pladon estas preta. Bon appetit!

## Bahan-bahan

2 Roti Tawar Tebal  
2 Butir Telur  
Keju Parut  
Garam  
Merica

## Cara Memasak

1. Tekan bagian dalam roti membuat bentuk persegi dengan menggunakan sendok.
2. Taburi roti dengan garam dan merica.
3. Pecahkan telur di atas bagian persegi dalam roti. Hati-hati supaya tidak menyentuh kuning telur.
4. Bumbui kuning telur.
5. Oleskan mentega di tepi roti, taburkan keju parut di atas mentega.
6. Masukkan roti ke dalam oven dan panggang selama 15 menit pada suhu 275 celcius.
7. Hidangan roti telur keju panggang sudah siap untuk disajikan. Selamat makan!

## Mia Sperto dum Instrui Esperanton ĉe Faktabahasa Bekasi

Ekde ĝi fondiĝis, la komunumo Faktabahasa min interesis. Tiu komunumo estas speciala por lingva amanto. Ĝin fondis mia amiko, Erlangga. Unue ĝi nur ekzistis en Bandung. Nun, vi trovas ĝin en kelkaj grandaj urboj, inkluzive Bekasi, mia urbo.

Faktabahasa estas unu komunumo, kie oni povas lerni iu(j)n lingvo(j)n, se haveblas la instruanto, kompreneble. Nun en Faktabahasa Bekasi haveblas almenaŭ 7 lingvoj, kiu oni povas lerni ilin. Ili estas araba, angla, japana, itala, franca, turka, kaj ankaŭ Esperanto. Mi mem instruas Esperanton tie ĉi.

La komunumo Faktabahasa Bekasi fondiĝis en septembro 2013. Mi unue ne volas iĝi instruanto ĉi tie. Sed multaj homoj petis min ĉar ilin interesis Esperanto. Do, finfine mi volonte instruis (kaj instruas) Esperanto al ili.

Ĉar ni ne estis tro serioza komunumo ni ne havis specialan lokon por havi komuna renkontiĝo. De kelkaj strategiaj lokoj, ni elektis komuna manĝejo en Bekasi Square, iu bazararo lokiĝas en la centro de Bekasi. Bedaŭrinde mi diros, ke tiam la E-lernado ne sukcese okazis pro kelkaj aferoj. Unue, mia okupo kaj studo estis tre multa tiam, do mi nur faris renkontiĝon sabate (dیمانĉe mi iris al Semanggi por alia E-renkontiĝo), eĉ je la 7-a vespere ĉar mia studo finiĝis je la 5-a kaj duono. Due, tie estis tre brua je tiu horo, do ni ne povas trankvile lernis. Tiu situacio okazis ĝis la 3-a generacio de Faktabahasa Bekasi.

En la 4-a generacio, (je la mezo de 2014) ni decidis por havi alian lokon. Unu loko kiu la plej taŭga estis komuna manĝejo en alia bazararo, Mega Bekasi. Tiu loko ne estis tro brua. Do ni povis trankvile lerni Esperanton. Tiam la lernado pliboniĝis. Tamen tio ne signifis ke la situacio iĝis plej bone. Ĉar preĝejo

(moskeeto) tie ne estis bona. Do mi trovis malfacilecon por havi preĝon, speciale en vespera preĝo (Magrebo) pro la mallonga daŭro.

Fino de 2014, iu bona sinjoro oferis al ni pli bona lokon, en lia oficejo kaj kursejo. Li estas ĉefo de kursejo IEC (angla) kaj interesiĝas pri lernado de fremdaj lingvoj. Li trovis nin ĉe Twitter kaj interesiĝis al ni. Do unue li invitis nin por havi diskuton tie kaj ankaŭ vidi la lokon. Estas tre bona kaj plej bona loko. Do ni akceptis lian oferon. Ni baldaŭ translokiĝis la lernolokon tien.

Tie estas bona loko. Ni povas pli serioze lerni. Ni ankaŭ povas uzi la facilecon tie kiel wifi, komputilo, klaso, k.t.p. do ni povas lerni Esperanto pli bone uzante tiujn ilojn. Tie ankaŭ ekzistas bonan moskeeton. La lernantoj pli ĝojas nun kaj ankaŭ mi.

Saya mengajar Esperanto di sebuah komunitas bernama Faktabahasa. Komunitas ini berdiri tahun 2013, dan mempunyai cabang di beberapa kota besar di Jawa. Komunitas ini adalah komunitas pecinta bahasa. Di komunitas ini, paaa anggotanya saling berbagi pengetahuan mengenai bahasa yang mereka kuasai.

Sebagai pengajar Esperanto di sini, banyak suka duka yang alami. Contoh, karena komunitas ini tidak mempunyai tempat khusus, akhirnya kami memakai tempat umum, seperti food court. Tentu saja sangat tidak memadai dan tidak nyaman untuk digunakan sebagai area belajar. Beruntung pada akhirnya, seseorang memberi kami tempat di sebuah tempat les. Tempat ini sangat memadai dan kami pun bisa belajar dengan nyaman. Kami sangat gembira.

**Verkisto: Eko Nur Syah**

*Anonceto:*

*Ni Ĝoje anoncis ke tri Indonezianoj, Ilia Sumilfia Dewi el Ĝakarta, Susilowati el Cibitung-Bekasi, kaj Syauqi Ahmad Zulfauzi el Bandung partoprenos La 48-an Konferencon de L&EI, 17-25 Julio en Oostende, Belgio, kaj 100-an Universalan Kongreson, 25 Julio-1 Augusto en Lillo, Francio. Dezirante la fruktodonan aranĝon kaj sukceson!*

## Agrabla, Mirinda, kaj Amuza Renkontiĝo en Ho Chi Minh

Raporto de 33a Komuna Seminario en Ho Chi Minh Urbo, Vjetnamio



Reza Pahlevi kun vjetnamaj esperantistoj en Ho Chi Minh, Vjetnamio

Mi tre ŝatas renkonti multajn esperantistojn kiujn havas diferencajn kulturojn. Mi havis hazardon por partopreni al la 33a Komuna Seminario. La seminario okazis en Ho Chi Minh Urbo, Vjetnamio. Komuna Seminario estas la junulara evento kiu kunlaboras kun junularaj organizoj, kiel Korea Esperanto-Junularo (KEJ), Japana Esperanto-Junularo (JEJ), Vjetnama Esperantista Junularo-Organizo (VEJO), kaj Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (CJEA).

Multaj esperantistoj partoprenis al la evento. La partoprenantoj estas 55 esperantistoj. Kvankam Komuna Seminario estas nur 4 reprezentantaj Junularo-Organizoj, sed esperantistoj ekster Koreo, Japano, Ĉinio, kaj Vjetnamio venis al 33a Komuna Seminario en Ho Chi Minh Urbo. La partoprenantoj estis el Usono, Hispano, Ĉinio, Indonezio, Koreo, Japano, kaj Vjetnamio. Ni faris multajn mirindajn programojn tie.

En 26a de decembro 2015, Ni faris ceremonion malferman. Kaj poste ni kunsidis por diskuti pri azia junularo-movado. Ni diskutis multe pri tio por bonigi esperanto-movado en Azio kun kunlaboro inter aziaj landoj. Ni ankaŭ prezentis pri niaj movadoj kaj naciaj

kuirartoj en niaj landoj, kaj kunmanĝis en manĝejo.

En 28a de decembro 2015, ni rigardis filmeton pri Onklo Ho Chi Minh. Gxi estis bona filmeto. Nun mi scias pri historio de Vjetnamio kaj vivo de Onklo Ho Chi Minh. Mi ankaŭ havis hazardon por prezenti pri raporto de niaj agadoj en Esperanto-Movado de Indonezio. Ni diskutis pri interlandaj kunlaboroj, problemoj de movado, kaj tiel plu. Poste Esperantistoj de Japano ludis bekfluton kaj kantis. Kaj la lasta estas ferma ceremonio kaj ĉirkaŭurba ekskurso.

La specialaj programoj por mi estas MISS ESPERANTO. Ĝi estas bona kaj amuza programo. Mi tre ŝatas tiun programon. La alia programo estas bankedo. Ni manĝas multajn manĝaĵojn en festivalo. Ĉar mi tre ŝatas manĝi, do tiu programo estas agrabla momento por gustumi tradiciajn manĝaĵojn de Vjetnamio. Ĉiuj programoj estas bonege!

Mi deziras ke ĉiuj agadoj kaj deziroj en nia esperantujo estos bone. Ni vivas revojn. Esperanto estas el esperoj, revoj, kaj deziroj. Kaptu niajn esperojn, revojn, kaj dezirojn por bonigi nian vivon kun esperanto.

Reza Pahlevi: zhalefy@gmail.com



## Laporan Kegiatan Klub Esperanto Yogyakarta

Meskipun bahasa Esperanto dianggap asing bagi sebagian besar orang di dunia, termasuk di Indonesia. Pecinta dan pelestari bahasa ini tetap ada dan bermunculan. Salah satunya yaitu di Daerah Istimewa Yogyakarta.

Di Yogyakarta, para pecinta bahasa ini biasanya berkumpul di salah satu lantai Perpustakaan Pusat Universitas Gadjah Mada, Yogyakarta dengan tujuan mengadakan kegiatan belajar bahasa tersebut.

Peminat bahasa ini umumnya berasal dari kalangan muda dari berbagai latar belakang pendidikan, khususnya mahasiswa perguruan tinggi dan beberapa pelajar sekolah menengah.

### Pasang Surut Klub Esperanto Yogyakarta

Dulunya klub bahasa Esperanto memang pernah eksis di kota gudeg ini. Namun kemudian tenggelam alias vakum. Kesibukan, selesainya studi anggota, dan sebagainya, membuat klub tersebut tidak aktif lagi.

Atas inisiatif beberapa orang, klub Esperanto di Yogyakarta kemudian muncul lagi. Kali ini dipandu oleh seorang penutur asal Spanyol, Ivan Garcia, yang menguasai seluk beluk bahasa Esperanto. Ia juga sedang menempuh studi di Universitas Negeri Yogyakarta.

Di Yogyakarta, kegiatan belajar mengajar bahasa Esperanto berlangsung seminggu sekali. Kegiatan belajar bahasa Esperanto yang dipandu Ivan bermula pada 16 Oktober 2014 hingga pertengahan Desember 2014.

Karena saat itu memasuki liburan panjang mahasiswa di Indonesia, kegiatan belajar bahasa

pun diliburkan. Hingga pertengahan April 2015, kegiatan belajar bahasa Esperanto belum aktif walaupun kegiatan kumpul bareng sesama anggota klub ini tetap berlanjut.

Setidaknya ada beberapa momen penting selama vakumnya kegiatan belajar bahasa Esperanto, di antaranya menerima kunjungan dari sesama penutur bahasa Esperanto dari Jakarta dan seorang lagi dari Jerman.

### Aktif Kembali

Vakumnya kegiatan belajar-mengajar bahasa Esperanto selama beberapa bulan membuat beberapa anggota yang rutin belajar berniat menghidupkan kembali kegiatan belajar bahasa Esperanto seperti sedia kala. Namun demikian, jumlah peserta belajar bahasa ini tidaklah terlalu banyak. Para peserta yang tertarik dengan bahasa ini cukup konsisten dalam kehadirannya, namun Ivan yang biasanya mengajar, karena kesibukan studi, untuk sementara waktu digantikan oleh Engel dan Ardianti yang cukup mengerti tentang bahasa Esperanto.

Kegiatan tetap berlangsung seminggu sekali, pada hari Kamis pukul 16.00 hingga selesai di Perpustakaan Pusat UGM. Kegiatan belajar-mengajar tersebut tidak dipungut biaya. Calon peserta yang tertarik bisa ikut bergabung dan belajar bersama.


Informasi klub Esperanto Yogyakarta bisa diakses melalui laman Facebook di Yogyakarta 'La Verda Paco'.

Yadin: [yadinnur92@gmail.com](mailto:yadinnur92@gmail.com)

## Informo de Internaciaj Esperanto-aranĝoj en Azio

Kio okazos en Azio en la jaro 2015? Notu & rimarku vian kalendaron!

- 2.26-3.8 : La 11-a internacia Himalaja Renkontiĝo (Nepalo)
- 2.28-29 : Tutlanda Kurskunveno de Korea Esperanto-Asocio (Koreio/Taejon)
- 4.4-5 : La 25-a Internacia Kurskunveno de Esperanto (Koreio/Chongdo)
- 4.19 : Malferma ceremonio de Monda Esperanto-Filma konkurso (Ĉinio/Hangzuo)
- 4.20 : Strategia Forumo de UEA pri Orientazia Movado'. (Ĉinio/Hangzuo)
- 5.16-23 : La 11-a Ĉina Esperanto-Kongreso kaj la 67-a kongreso de Fervojistoj (Ĉinio/Kunming)
- 8.18-20 : Internacia Junulara Renkontiĝo (Pakistano/Nankana-Sahibo)
- 8.27-28 : La 2-a Irana Esperanto-Kongreso (Irano/Teherano)
- 8.28-30 : La 1-a Internacia Kongreso de esperanto (Pakistano/Murree)
- 9.18-20 : Internacia Junulara-Renkontiĝo de Esperanto (Pakistano/ Nankana-Sahib)
- 10.03-04 : La 47-a Korea Kongreso de Esperanto (Koreio/Seulo)
- 10.8-11 : La 11-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado (Koreio/Seulo)
- 10.10-12 : La 102-a Japana Esperanto-Kongreso (Japanio/Sendai)
- 10.23-25 : La 6-a Internacia Esperanto-Festivalo en Zaozhuang, Shandong-provinco, (Ĉinio)
- 10.31-11.1 : La Kongreso de Tyugoku kaj Sikoku (Japanio/Simonoseki, ĉe Esperanto-Biblioteko)
- 11.28-29 : Aŭtuna Kurskunveno en Lernejo Namkang (Koreio/Chongdo)
- 12.25-26 : La 38-a Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio (Pakistano/Lahore)
- 12.25-28 : La 34-a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana, Korea kaj Vjetnama Junularoj (Koreio)
- 12.30-1.2 : Transjara Kurskunveno de Esperanto-Populariga Asocio (Japanio/ Kameoka)



### *Nun haveblas en indonezia lingvo!*

*La libro de Stano Marček  
"Esperanto laŭ Reĝta Metodo"*

*ĵus eldoniĝis en la indonezia lingvo. Ĝia titolo estas "Esperanto dengan Metode Langsung".*

*Tradukiĝita de 4 indoneziaj esperantistoj, tiu ĉi libro helpas vin pli rapide kaj pli facile lerni la internacian lingvon, Esperanto.*

*Vi povas aĉeti ĝin kontraŭ Rp. 45.000/libro.*

*Kontaktu **Ilia Dewi** ĉe 08111773387 aŭ  
estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com*



## Mia Unua Kongreso De Peter Johns (Melburno)

Mi ĉeestis la kongreson de Esperanto kaj somerkursaron kiu okazis en Melburno ĉe Internacia Domo dum 9 tagoj en januaro. Tiu estis mia unua kongreso, kaj mi ĉeestis ĉar mi volis plibonigi mian Esperanton per lecionoj kaj babilado kun aliaj homoj. Mi lernas Esperanton por komuniki, kaj mi trovas ke ĝi estas pli grava por mi, je mia nivelo, paroli ol ĉeesti lecionojn, sed la lecionoj ankaŭ estis bonaj. 50 homoj venis el 8 landoj (Aŭstralio, Nov-Zelando, Orienta Timoro, Indonezio, Ĉinio, Ĉeĥio, Nov-Kaledonio, kaj Koreio) kaj, kvankam mi ne provis interparoli kun ĉiuj, tiuj kiujn mi ja interparolis helpis min esti pli komforta kiam mi parolis la lingvon.

Estis tri niveloj de lecionoj (komencantoj, progresintoj kaj spertuloj). Mi ĉeestis la lecionojn por progresintoj. Mi trovis la lecionojn interesaj kaj helpaj en iuj aspektoj, kaj malfacilaj en aliaj.

Sabaton, Nicholas Halls (unu el la produktoroj) prezentis sian filmon "54 Tagoj" en la angla lingvo kun Esperanto-subtekstoj. Ĝi havis psikologian temon, pri grupo de homoj kiuj enŝlosas sin en bunkro pro ĥemia milito. Estis bone vidi lokan aŭstralian filmon kaj plejparte ĉiuj ĝuis ĝin.

Dimanĉon, ni ĝuis prelegon de Ilia el Indonezio, pri ŝia lando kaj kulturo. Ŝi kantis, dancis en tradicia kostumo, kaj ankaŭ donis al ni guston de indoneziaj manĝaĵoj kiujn ŝi kunportis por kundividi. (Ŝia valizo sendube estis tre plena!)

Ni ankaŭ spertis orienta-timoran vesperon je lundo, prezentita de Teofilo. Li rakontis pri krokodiloj en sia kulturo, kun bildoj, kiujn li mem desegnis. Poste li kantis tradiciajn kantojn per ukulelo kaj gitaro.

Dum la posttagmezoj, mi ĉeestis diversajn interesajn prelegojn pri temoj inkluzive de tertremoj, art-aprezado, biciklado, interlingvistiko, kaj eĉ la progreso de nova angla romano kiu enhavas esperantistajn karakterojn.

Merkredon, Hyon-Suk Li el Koreio instruis al ni la

korean alfabeton kaj kelkajn vortojn, kaj montris al ni belan korean robon nomitan "Hanbok". Poste, ŝi dancis kun helpo de siaj amikinoj, kaj tiam instruis al la plej kuraĝaj kongresanoj kiel danci "Ganghamstilon".

Tiun vesperon ankaŭ okazis debato pri la temo: ĉu sencon havas promesi amon ĝis la morto? Post tio, okazis kvizo de Trevor, sed mi preferis rigardi! Ĉiuj aliaj verŝajne ĝuis ĝin.

Ni tramiris al St Kilda ĵaŭdan vesperon por espereble vidi pingvenojn. Kvankam mi loĝis en Melburno dum tri jaroj, mi neniam antaŭe vizitis la pingvenojn. Ni atendis inter multaj homoj ĝis sunsubiro (kiu estis belega!) kaj poste vidis kelkajn etajn pingvenojn kiuj kuris trans la sablo al siaj hejmoj inter la rokoj.

Vendredon, ni aŭskultis belajn kantojn de la kantgrupo de Alan, kiu renkontiĝis dum la semajno por provi. Ni ankaŭ rigardis teatraĵon verkitan de Kam pri Esperanto-TV. Hyon-Suk kaj sia amikino prezentis pli da dancoj, korea kaj flamenka.

Post la spektaklo okazis aŭkcio kiu estis distra (pro la sperta gvido de Trevor) kaj sukcesa.

Je la lasta tago ni iris per buso al la ĝardenoj Alfred Nicholls, kie ni


piknikis kaj rigardis la belajn ĝardenojn. Ni eĉ vidis anasidojn sur la lago. Poste ni iris al la Sanktejo William Ricketts kie estas argilaj skulptaĵoj de indiĝenaj aŭstralianoj inter la arboj. Tiu estas tre bela kaj paca loko. Post nia ekskurso ni revenis al Internacia Domo por ĉeesti la finan eventon: tiu estis la bankedo, kie ni ĉiuj babilis, manĝis, trinkis, kantis, kaj estis feliĉaj.

Mi havis bonegan semajnon da lernado, komunikado, kaj amikiĝado. Mi rekomendus la sperton al kaj novaj kaj malnovaj esperantistoj.



**Verkisto de Peter Johns (Melburno)**

## Keppel Earl Enderby (1926–2015)



Keppel Earl Enderby

Nia estimata kaj kara Kep, iama prezidanto de UEA kaj de AEA, forpasis la 8-an de januaro. Pro lia agado en la Esperanto-movado, funebras homoj tra la mondo.

Kep naskiĝis la 25-an de junio 1926 en Dubbo NSK kaj tie ĉeestis la elementan kaj altlernejojn. En 1944 la 18-jarulo aliĝis al la aŭstralia flugarmeo (RAF) kiel pilotlernanto (1944-45) kaj sekve ankaŭ flugis helikopterojn ĝis siaj 60aj jaroj. Post la Dua Mondmilito li studis juron ĉe la Universitato de Sidnejo, kaj dum 1950-54 ĉe la Universitato de Londono, kie li poste laboris kiel advokato kaj instruisto.

En 1951, amatora golfludanto Kep partoprenis en la brita "Open" konkurso, kaj sin montris tiom talenta, ke li superis ĉampionojn Kel Nagle kaj Norman Von Nida, ludis kun eminentulo kia Peter Thompson, kaj eĉ dum kelka tempo ŝanceliĝis ĉu iĝi advokato, ĉu profesia golfludanto.

En 1955 li revenis al Aŭstralio kaj praktikis la juron en Sidnejo. Li translokiĝis al Kanbero en la '60-aj, ekde 1962 kiel universitata preleganto ĉe la Aŭstralia Nacia Universitato. Dum la '50-aj kaj '60-aj, li estis aktiva advokato por civilaj rajtoj; li helpis starigi la NSK-an Konsilantaron por Civilaj Liberecoj – ĉiam por li granda pasio. En 1970, en krombaloto, li elektiĝis laboristpartia parlamentano por la Aŭstralia ĉefteritorio (ACT). En 1972 ĉefministro Gough Whitlam nomis lin la unua Ministro por ACT (poste renomita Kanbero) kaj por la Norda Teritorio.

Kep rapide montris sian kapablon, tenante plurajn ministrecojn. Li respondecis pri aŭstralia produktado kaj poste pri justico. En Februaro 1975 li iĝis ĉefa

Juroficio (Attorney General). Li multe atingis, inkluzive de leĝoj por malkriminaligi kaj aborton kaj samseksemon en ACT, kaj de leĝoj por nuligi eksedziĝkulpdon en Aŭstralio. Laŭ kolegoj, lia parlamenta servado plenis je distingo. Li estis vaste respektita en diversaj politikaj kaj juĝistaj rondoj.

En 1975 la Laborista Partio malsukcesis kaj Kep revenis al la advokataro. De 1982 ĝis sia emeritiĝo en 1992 li estis juĝisto ĉe la Supera Kortumo de NSK. Ĝis 2000 li estris la Revuan Konsilantaron por Gravaj Kulpuloj (Serious Offenders Review Council). Li ĉiam arde advokatis por la bonfarto de malliberuloj, opiniante ke ĝis 80% de malliberuloj en Aŭstralio devus esti liberigataj; laŭ li, enkarcerigi la plimulton da krimuloj estas ne efike. Tamen, li aplikis la juron ĝuste kaj juste, sed ankaŭ korkonscie. Li prezidis kiel ĉefo de la Libervola Eŭtanazio-Societo de NSK dum 6 jaroj. Li kaj Dorothy arde defendis sian rajton mem fini la propran vivon kiam tiu ne plu restas eltenebla.

Ili translokiĝis de Kanbero al Balmain, ĝuante jakto-veladon, flugojn en malpezaj aviadiloj, legadon kaj... enkondukon al Esperanto. La onklo de Kep estis delegito de UEA; jen la semo de la intereso. Kep eklernis Esperanton en 1987 kun la helpo de aŭstralia diplomato kaj fervora esperantisto, Ralph Harry. Kompreneble, kiel dumviva ĉampiono de homaj rajtoj, civilaj liberecoj kaj la subprematoj, Kep firme kredis ke la internacia lingvo, se parolata tra la tuta mondo, malpliigus inter-homan konflikton. Sendube multaj konsiderus tion romantika ventmuelila alpiko. Sed la koro de Kep, kiel tiu de Zamenhof, celis internacian harmonion tiuvoje. Kep ankaŭ arde legis la verkojn de la anarkista princo

Pjotr Kropotkin kaj fervore subtenis la Sennaciecan Asocion Tutmondan.

Kep estis prezidanto de AEA de 1992 ĝis 1997, en kiu jaro li gvidis la organizadon de la 82-a UK en Adelajdo. La sekvan jaron, 1998, oni elektis lin prezidanto de UEA. Li estis membro de la Komitato de UEA dum kvar oficperiodoj 1992-2004, krom prezidanto de la Esperanta Jura Asocio 1996-2002. La Ondo de Esperanto proklamis lin Esperantisto de la Jaro 1999. En 2004 li estis elektita membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Ne surprize, estinte parlamentano, advokato, kaj arda leganto, Kep elstaris en siaj paroladoj kaj verkitaĵoj artikoloj.

Entute rimarkinda homo. Adiaŭ, Kep, sindediĉulo bonhumorplena, kun impertinenteca humurosenco kaj rideto neforgesebla. Niajn plej profundajn kaj sincerajn kondolencojn al Dorothy kaj la familio Enderby.

#### Kondolencoj:

Kep estis grava gvidanto de la Esperanto-movado en Aŭstralio kaj la mondo, kaj tre bona amiko al multaj el ni esperantistoj. Kiam mi unue renkontis lin en Toowoomba (li multe vojaĝis por subteni Esperanton en multaj provincoj) mi apenaŭ parolis Esperanton kaj miris ke estas tiel facile amikiĝi kun la prezidanto de AEA.

Mi fieris ankaŭ pri lia ekster-Esperanta aktiveco por defendi homajn rajtojn. Estis kortuŝa sperto partopreni la duan Azian kongreson de Esperanto en Hanojo kun pluraj Aŭstralianoj, kune kun Kep. En 1972 Kep estis ministro en la Aŭstralia registraro, kiu haltigis la militon kontraŭ Vietnamujo. En 1999, dum la kongreso, vietnamanoj honorigis Kep, la tiaman

prezidanton de UEA.

Kep kaj Doroteo restos en historiaj rakontoj kaj en niaj koroj.

#### Hazel Green

Mia unua ekscio de Esperanto estis kiam mi aŭdis radiointervjuon kun Kep Enderby ĉe ABC en aviadilo. Li inspiris kaj konvinkis min pri la valoro kaj idealismo de Esperanto. Post kiam mi informis lin pri lia konvertiĝo de mi, li ĉiam pensis pri mi kiel sia speciala disĉiplo.

#### Steven Pitney

Kvankam mi renkontis Kep nur kelkfoje, mi memoras lin kiel klarpensantan, energioplenan, pozitivan esperantiston. Kaj mi ankaŭ tre simpatiis kun multe da liaj aliaj vidpunktoj (ekz-e pri homaj rajtoj kaj aŭstraliaj aborigenoj) kaj la fakto ke li vere klopodis plibonigi la rilatojn inter UEA kaj SAT.

#### Sandor Horvath

Kiel politikisto Kep povis vojaĝi senpage al multaj kongresoj por reprezenti Aŭstralion. Pro sia scio kaj kapablo li sukcesis verki por radio 3ZZZ statuton kaj konvinki la estraron akcepti Esperanton inter la pli ol 70 komunumaj lingvoj. Li estis tre afabla sinjoro.

#### Jennifer Bishop

Mi neniam renkontis Kep sed mi aŭdis iujn liajn mirindajn oratorajojn kaj mirindajn raportojn de li. Ĉiuj en la Esperanto-Ligo de OA, kun mi, esprimos kondolencojn.

#### Trish O'Connor

#### Verkisto de Vera Payne (Floreat)

*Membrigu!*

*Aliĝu!*

INDONEZIA  
ESPERANTO  
*Kontribu!*

*Keanggotaan IEA terbuka bagi semua rakyat Indonesia. Yang penting Anda yakin akan pentingnya sebuah bahasa internasional yang mudah dipakai dan mendukung penyebarannya. IEA juga mengundang klub-klub Esperanto yang hendak bekerja sama atau mengikuti kegiatan yang ada. Hubungi pengurus IEA melalui estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.*

*Biaya keanggotaan tahun 2015 adalah Rp 100.000,00 bagi pelajar dan pensiunan, serta Rp 150.000,00 bagi yang lainnya, yang dapat dibayarkan melalui Bank Mandiri a/n Sondang I.S.D., no. rek. 070-00-04789801-8.*

*Membreco en IEA estas malferma al ĉiu Indoneziano. Sufiĉas, ke vi kredu je la graveco de utila internacia lingvo, Esperanto kaj ĝia disvastigo tra la lando. IEA ankaŭ bonvenigas klubojn kiuj volas iĝi sekcio de IEA. Se tio interesigas vin, kontaktu la estraron ĉe estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.*

*La membrokotiĝo estas Rp 100.000,00 por studentoj, senlaboruloj, kaj pensiuloj, kaj Rp 150.000,00 por aliaj. La kотиĝo estas pagebla tra Bank Mandiri, nome Sondang I.S.D., no. 070-00-04789801-8.*





**ESPERANTO EN INDONEZIO** estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraĵ subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompencon pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuajo konformas kun la celoj de la bulteno.

Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas ni ajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj, laŭeble, sekvi ilin. Dankon!

- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la indonezia lingvo.
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo.
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel eble plej seneraraj kaj en bona stilo.
- Bonvolu sendi la tekstojn en unu el la jenaj formatoj: .txt, .rtf, .odt, .doc. Nur se vi ne povas sendi en unu el la ĉi-supraj formatoj, sendu en .wpd aŭ docx. Ne sendu .pdf-dokumentojn!
- Se vi uzas surrogaton por la Esperantaj litoj, uzu la saman por ĉiuj literoj de la dokumento.
- Uzu nur unu litertipon por unu dokumento.
- Se eblas, sendu ankaŭ bildojn, laŭeble altkvalitajn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni aparte, kun la jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo - iuj povus malaperi survoje.
- Sendu vian kontribuon per Facebook nur kaze, ke vi tute ne povas sendi retmesaĝojn, kaj resendu ĝin se vi ne ricevas konfirmon pri la ricevo.
- Bonvolu sendi la kontribuajojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento.
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn.
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: [redakcio-ideo@googlegroups.com](mailto:redakcio-ideo@googlegroups.com).

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La bultenon **ESPERANTO EN INDONEZIO** ricevas la membroj de IĖA. Por ne-membroj ĝi aĉeteblas ĉe la redakcio de IĖA ([redakcio-ideo@googlegroups.com](mailto:redakcio-ideo@googlegroups.com)) kontraŭ 1 €/ekz aŭ Rp 17.000,00 + efektivaj sendokostoj. Donacantoj al la indonezia Esperanto-movado ricevas ĝin elektronike kaj laŭpete ankaŭ papere.

**ESPERANTO EN INDONEZIO** adalah sebuah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Tim sukarelawan mengerjakannya dan buletin ini dapat terbit berkat para kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Baik tim redaksi maupun kontributor tidak menerima kompensasi apa pun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin tercipta sebaik-baiknya dan untuk mempermudah pekerjaan redaksi, kami meminta seluruh kontributor membaca dengan teliti saran dan petunjuk berikut, dan sebisa mungkin mematuhi. Terima kasih.

- Redaksi hanya menerima tulisan dalam bahasa Esperanto dan Indonesia.
  - Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu dari dua bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi.
  - Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksalah tulisan tersebut lebih dahulu bersama orang lain yang lebih berpengalaman. Hal itu dapat dilakukan di pertemuan Esperanto, sebagai bagian dari pembelajaran, atau secara online. Kesalahan dalam tulisan sebisa mungkin diminimalisasi dan tulisan dibuat dalam gaya bahasa yang baik.
  - Mohon kirikan tulisan dalam salah satu format berikut: .txt, .rtf, .odt, .doc. Hanya jika Anda tidak bisa mengirimnya dalam salah satu format yang telah disebutkan, gunakan format .wpd atau .docx, jangan kirikan tulisan dalam format .pdf!
  - Jika Anda menggunakan 'pengganti' huruf Esperanto, gunakan format yang sama untuk seluruh dokumen.
  - Gunakan hanya satu jenis huruf untuk satu dokumen.
  - Jika mungkin, kirikan juga gambar (sebisa mungkin yang berkualitas tinggi), yang sebaiknya tidak disertakan dalam dokumen teks. Gambar dikirim terpisah dari tulisan, dengan informasi untuk masing-masing gambar berupa penjelasan/judul gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirikan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim terlalu banyak gambar dalam sekali pengiriman. Beberapa foto bisa saja hilang dalam proses pengiriman.
  - Silakan kirim kontribusi artikel Anda melalui Facebook, hanya ketika Anda sama sekali tak bisa mengirimnya lewat surel (e-mail), dan kirimlah pesan itu sekali lagi jika Anda tak menerima konfirmasi bahwa artikel Anda telah diterima.
  - Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu.
  - Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu.
  - Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: [redakcio-ideo@googlegroups.com](mailto:redakcio-ideo@googlegroups.com).
- Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.